# HEJS-JUNECO

Hispana Esperantista Junulara Societo (H.E.J.S.)

JUNULARA SEKCIO DE H.E.F. LANDA SEKCIO DE T.E.J.O.




el kataluna: esperanto atendas vin! venu!

## NUMERO 133 (JAN. - FEB.)

* * *

*En ĉi-numero:*

* *Portugalaj noticoj.*
* *31 IS en Hanovro.*
* *Naskiĝas JEKA.*
* *Landa Agado.*
* *Juna Suno por Valencio kaj Murcio.*
* *Scienca Agado en TEJO.*
* *Estrara alvoko kunveno de KEJ.*
* *Humorajoj.*

*HEJS-JUNECO*

*Red. Jesuo Armengol.*

*Kunlaboris: Anna Andreu, Nuri Martínez, Joan Felip Artero, Anna Pedrola, Antono Fragoso, Natxo Apaolaza, Joao Santos, Antonio Rodriguez, Carlos Azagra.*

*Eldonkvanto: 300 ekz.*

# ADRESOJ

HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

**HEJS**

Centra Oficejo:
Sol, 75.
41003-SEVILLA
Andaluzio
Tfno.(954)415991

Madrida Oficejo ĉe
Madrida Esperanto Junularo

Barcelona Oficejo ĉe
Atomo

## revuoj

Hejs-Juneco
Jesuo Armengol i Arbiol
Francesc Moragas,95. 3-2
08922-STA COLOMA DE GRAMENET
Katalunio
Tfno.(93)3865533

La Mano
Jorge Camacho Cordón
Chantada, 43. 1-J
28035-MADRID
Madrido
Tfno.(91)7395652

## federaciiĝintaj asocioj

KATALUNIO
Atomo
Carreras Candi, 34-36
08028-BARCELONA

Sankta Kolomba E-o Grupo
Sant Josep, 20
08922-STA COLOMA DE GRAMENET

Komitatano: Jesuo Armengol i Arbiol

ARAGONO
Junulara E-ista Societo Aragona
Apdo. 149
50080-ZARAGOZA

Komitatano: Juan C. Nuño Casión

MADRIDO
Madrida Esperanto Junularo
Atocha, 98.4º
28012-MADRID

Komitatano: Jorge Camacho Cordón

ANDALUZIO
Andaluzia Esperanto Junularo
Apdo. 611
14080-CORDOBA

Komitatanoj:
Ricardo F. Albert Reyna
Esther Morillas García

## jen ni

*Saluton karegaj:*

*Eble vi ricevos ĉi numeron tuj antau ol ekiri al Monistrol. Mi devas insisti pri tiu tendaro ĉar specialas pluraspekte. Temas pri nova maniero por aranĝi niajn renkontiĝojn. Specialas ĉar oni devos decidi en la kunvenoj pri tre gravaj aferoj kiuj tuŝas nian movadon. Specialas ĉar okazas en Katalunio, bona ebleco por koni la movadstaton ĉi tie. Kaj specialas ĉar la tendaron faros ĉiuj ni, kaj ĝi estos tia kian ni volos.*

*Venu, nepre kun bona humor o kaj amikeco.*

*Kisegojn.*

*Jesuo Armengol*

# Estraraj informoj

*Estas jam preskau tradicio, ke de tempo al tempo aperas sur la paĝoj de nia revuo serioza alvoko al nia societo far la estraro. Hodiaŭ ni ne plendos pri la mallaboremo de niaj membroj (ne pli ol 5 personoj aktive kaj ofte agadas en nia asocio), ĉar tiu jam estas elvzita temo kaj ni malofte ricevas novajn apogojn. Ni direktos nian atenton al alia problemo: Antaŭ du jaroj ni komencis ŝanĝi la strukturon de HEJS kaj igi ĝin Federacia. Pasis jam tiu tempo kaj nur 5 grupoj kuniĝis en tiu aventuro, kiu celis plimodernigi kaj plidemokratigi la situacion de ŝtata organizo en lando, kiu politike restrukturiĝis en aŭtonomaj kumunumoj. De tiam du gravaj problemoj ekaperis, la unua fizika, la dua morala. Unuflanke ni devis alfronti, ke la estraro de HEF ne afektis tute apoge, kiam sciiĝis pri tio, ke ni celis veran federacion (kio detruus la aktualan centrisman sistemon). Aliflanke, nia alvoko ŝajnas ne esti serioze atendita de la hispana junularo. Tiu dua afero multe pli disbatis nin. Ni scias pri pluraj grupoj organizitaj tra la nacia teritorio, kiuj ankoraŭ ne respondis decide al nia propono. Tiu longa hezitotempo tute senesperigas niajn iluziojn. Ni plurfoje klarigis, ke kompreneble ni ne esperas kalkuli komence pri tute organiziĝintaj kaj bone funkciantaj grupoj, ĉar ni komprenas, ke estas preskaŭ eterna laboro bone organizi tiajn asociojn. Nia propono, interalie, estas atingi tiun celon komune per la interŝanĝo de eksperto, por ekzemplo. Tria problemo aldoniĝas: Niaj jam federaciiĝintaj asocioj ne kutimas atenti pri multaj petôj, kiujn ni de tempo al tempo ni adresas por la bona funkciado de federacia sistemo. Problemoj, kiaj pago de kotizoj, informo pri membroj, partopreno en la medioj de nia asocio, ktp., estas ankoraŭ solvendaj. Do, jenan demandon ni lanĉas. Ĉu rezigni la federacian solvon kaj reiiri al la pasinteca sistemo?. Ni iom post iom perdas niajn fortojn kaj iluziojn rilate la estonto de tiu sistemo. Pripensu la aferon kaj en Monistrol ni havos la ŝancon profunde diskuti tiun ĉi temon. Ni forte esperas, ke ĉio solviĝu kaj laboros energie ĝis niaj fortoj tute elĉerpiĝas. Ricevu ĉirkaubrakon.*

*Prezidanto de HEJS*

*Tiu ĉi revuo de nun sendiĝas ankaŭ al al portugalaj kaj nordafrikaj samideanoj, kiu kunlaboras kun HEJS ene de la fako "Landa Agado" de TEJO por la vigligo de la movado en iliaj respektivaj landoj. Se vi volas kunlabori en tiu programo aŭ deziras korespondi kun ili, adresu bonvole al la centra oficejo.*


*Oni rememorigas, ke J.E.S.A., M.E.J. kaj A.E.J. devas ankoraŭ pagi siajn respektivajn federaciajn kotizojn kaj sendi la definitivan liston de membroj, por ke ili povu ricevi ankaŭ HEJS-JUNECO-N.*

---

-Panjo, ĉu mi povas naĝi en la puto?
-ĉu vi frenezas?
-Kial? mia frateto estas interne de antaŭ du horoj, kaj vi nenion diris.

-Via edzino diris al mi ke via edzeco ne bone marŝas, ĉu vere?.
-via edzino ne respektas eĉ la litan intimecon

Natxo



Esperantistoj en Sant Cugat
De live dekstren: Trini García, Josep Mª Soler, Brigitt Casadevall, Adán Sánchez, Jesuo Armengol

## naskiĝas JEKA

*Ekde la 20a de novembro estas oficiala nova memstara organizo en Katalunio: JEKA (Junulara Esperantista Kataluna Asocio).*

*Ĝi celas esti alternativo por organiziĝo de junaj esperantistoj en Katalunio.*

*Post Ĝenerala Asembleo la 15an de Januaro oni konfirmis jenan estraron:*

*Prezidanto: JESUO ARMENGOL*

*Vic-prezidanto: JORDI FERRE*

*Sekretario: ERICH ZAMORA*

*Kasisto: SALVADOR GUILLERMO*

*Vokaloj: MONICA FONT, FEDERICO SUAREZ, JOSE GONZALEZ.*

*Oni decidis aliĝon al HEJS-HEF kaj al TEJO-UEA.*

*Federaciiĝo al HEJS okazos dum Monistrol.*

*Oni fiksis kotizon je 500 ptoj. Bone akceptataj estas donaco de protektantoj:*

*Oni preparis renkontiĝon por la 27-28an de Februaro.*

*La Asocio petas la kunlaboron de katalunaj esperantistoj.*

*Informoj kaj aliĝoj:*

*JUNULARA E-ISTA KATALUNA ASOCIO*
*Ap. 23484*
*08080 BARCELONA*
*Tf. (93) 386-55-33*

## KEJ KUNVENO

*La 6-7an de februaro okazis rekontiĝo de KEJ en Taragono por elredakti internan regularon kaj por starigi la novajn komisionojn, sekciojn. Unu el la plej grava punkto por diskuti tamen, estis la rilato HEJS-KEJ. (Pri kiu propono vi legis en pasinta numero de HEJS-JUNECO).*

*La HEJS-sekcio en KEJ ne realiĝos, almenaŭ momente. Post oficialigo de la nova Junulara E-ista Kataluna Asocio (JEKA), kaj en tie unua kunveno oni decidis ne aliĝi al KEJ kaj des malpli sub la kondiĉoj skribitaj en la proponita kontrakto. Tamen KEJ decidis partopreni en la HEJS-tendaro en Monistrol. Pri la cetera enhavo de la kunveno aperos informojn en KATA-LUNO (organo de KEJ).*


LA KLAĈO
BEDAŬRINDE, S-RO ĜOJO NE ESTAS ĈITIE. LI IRIS AL HOSPITALO VIZITI SIAN AVINON.
VIRO: ĈU S-RO ĜOJO ESTAS ĈITIE?
SEKRETARINO: NE! LI IRIS AL HOSPITALO.
V: ĈU? TAMEN LI KOMISIIS MIN LAVI LIAN AŬTON. ĈU LI LASIS LA ŜLOSILARON?
S: LIA AŬTO NE ESTAS ĈITIE, MI BEDAŬRAS. ĜIN REMORKIS LA POLICANOJ.
VIRO: ĈU VI AŬDIS PRI S-RO ĜOJO? LI ESTAS EN HOSPITALO!
INO: MI NE SCIIS! KIO OKAZIS?
VIRO: AŬT-KOLIZIO, MI SUPOZAS. MI NUR SCIAS, KE LA POLICANOJ REMORKIS LA AŬT-RESTAĴOJN.
INO: HO! MI VIDIS AMBULANCON, KIAM MI VENIS ĈI TIEN!
EL ANGLIGIS: GONĈJO
20/9/87
ĈU VI AŬDIS PRI S-RO ĜOJO? AMBULANCO PORTIS LIN AL HOSPITALO JE LA 8 45 ĈI-MATENE. LIA AŬTO SERIOZE KOLIZIIS.
ĈU NI SENDU DONACON AL S-RO ĜOJO?
MI AŬDIS, KE LI HAVAS ALERGION JE FRAGOJ.
ĈU KELKAJN FRUKTOJN? ĈI-MATENE MI VIDIS BELASPEKTAJN FRAGOJN ĈE LA BAZARO.
LIFTO
VIRO: ĈU VI AŬDIS PRI S-RO ĜOJO?
INO: NE... KIO OKAZIS?
V: TERURE! LIA AŬTO KOLIZIIS. ONI DIRAS, KE LI ESTAS EN HOSPITALO POR SEVERA KURACADO.
I: ĈU ONI OPERACIOS LIN?
V: NU, MI TUTE NE SCIAS! MI AŬDIS, KE LI HAVAS MULTE DA ALERGIOJ.
ĈU VI AŬDIS PRI S-RO ĜOJO? KOMPATINDA! ONI PORTIS LIN AL HOSPITALO POST TERURA AŬT-KOLIZIO. TAMEN ONI NE POVAS OPERACII LIN, ĈAR LI HAVAS ALERGION JE ANTIBIOTIKOJ.
MIA FRATINO HAVIS ALERGIOJN, SED ŜIN KURACIS SVISA SPECIALISTO
V: ĈU VI SCIAS, KIEL FARTAS S-RO ĜOJO?
INO: HO! ANKAŬ VI AŬDIS PRI TIO! MALBONAJ NOVAĴOJ KVAZAŬ FLUGAS... MI AŬDIS, KE LI DEVAS KONSULTI SVISAN SPECIALISTON.
V: TIO ESTOS MULTE KOSTA!
INO: FAKTE. TAMEN TIE ĈI LABORAS 3000 HOMOJ. ĈU NI FARU MONKOLEKTON?
INO: NI MONKOLEKTAS POR S-RO ĜOJO.
VIRO: KIU ESTAS TIU?
I: LI LABORAS ĈE LA KONTAD-FAKO. LIA AŬTO TERURE KOLIZIIS, KAJ PROTIO ONI VENIGOS ĤIRURGON EL ĜENEVO. LI NE PLU LABOROS...
V: KOMPATINDA! NU, JEN 50 STELOJN...
S-RO ĜOJO: SALUTON! KIE ĈIUJ KAŜIS SIN?
SEKRETARIINO: MI TUTE NE SCIAS, S-RO ĜOJO! KIEL FARTAS VIA AVINO?
Ĝ: NUN ŜI BONE FARTAS. FINFINE, ŜIN NE TRAFIS KOR-BLOKADO: FAKTE, NUR MISDIGESTO. NU, MI DEVAS FORIRI KAJ ELPORTI MIAN AŬTON EL POLICEJO. ĜIN MI PARKIS NUR KELKAJN MINUTOJN SUR DUOBLA FLAVA LINIO, DUM MI IRIS AĈETI FLOROJN, TAMEN ONI REMORKIS ĜIN!

## juna suno



La ideo, jam de antaulonge pripensita de Antono Verdú, Josè M.Bernabeu kaj Carles Moya, finfine ekrealiĝis: naskiĝis JUNA SUNO.

Ni malkovris manieron havigi al ni pli malpli grandan esperantogrupon, pere de la malgrandetaj.

Nia organizaĵo estas tia: Dum kelkaj monatoj ni havas "rondiran kunordiganton", kiu okupiĝas pri la informado, zorgas pri la organizo de venontaj renkontiĝoj, informas al la ĵurnaloj kaj radioelsendejoj, ktp. Dum la sama tempo, la "rondira instiganto" kontrolas tion kion la kunordiganto faras, kaj samtempe lernas agadi. Post ses aŭ ok monatoj, la instiganto fariĝas preta kunordiganto kaj oni nomas novan instiganton. Tiel ni ne laciĝas pro la troa laboro, la organizaĵo ne dependas ĉiam de la samaj personoj, ĉiuj pli malpli partoprenas kaj la izolitaj geesperantistoj kunformas solidan grupon.


Per nia sperto, ni konstatis ke tiu ĉi sistemo estas tre taŭga por izolitaj kaj netro malproksimaj esperanto-grupetoj.

Nia historio daŭras jam preskaŭ du jarojn. Antono Verdú estis la unua kunordiganto, Josè M. Bernabeu la dua. Poste Fernando Gil el Orihuela, kaj nun estas Pedro Macanás el Murcio.

Ĝis la nuna tempo, multaj personoj partoprenis la grupon, kelkaj daurigis en ĝia movado, aliaj ĝin forlasis pro malsamaj kialoj, sed al ĉiuj plaĉis la juna etoso de niaj renkontiĝoj por granda ĝojo de ĝiaj membroj.

El Valencia Luno


PERSONE
62 minutoj.



Mendebla ĉe:Borje Lund, Skebokvarnsv. 45, S-124 33 Bandhagen.

ROKMUZIKO EN ESPERANTO


## C. AZAGRA

Carlos Azagra (pli ofte Carlitos) naskiĝis en la urbeto Morón de la Frontera. Lia desegnista aktivado komenciĝis cefe antaŭ 10 jaroj. Li desegnis pli ol 40 komiksojn, desegnaĵojn ktp. en fanzinoj, ĵurnaloj, magazinoj, revuoj pri ĉio kiel: Diari de Barcelona, Avui, Makoki, HdiosO, Liberación, Asti, Andalán kaj El Jueves, revuo en kiu hodiaŭ li serioze partoprenas per "Pedro Piko y Pico Vena". Ĉi-sube aperas intervjuo kun Azagra, simila al kiu Jesuo faris al Alberto Franco.

Katalunio: mia tria patrujo.
Saňta Coloma: mia patrujo.
Esperanto: bona ideo kvankam tro fermita.
Angla lingvo: tio rememorigas imperiismon
Patriismo: stultismo.
Internaciismo: sanajo.
Libereco: Ⓐ
Faŝistoj: fiuloj.
La plejo: drinki bieron kun miaj geamikoj
Biero: vitamino kiun oni devas scii, uzi.
HEJS-JUNECO: bonega fanzino.
Kion vi dirus al la tuta mondo se ili vin aŭskultus: landlimoj for!.

Joan Felip Artero

Noto: C. Azagra seninterese desegnis la novan kaptitolon de nia revuo.

# Portugalio

Saluton najbaroj kaj najbarinoj:

Jen diversaj noticoj en nia lando. La 12an decembro ni festis la datrevenon de Zamĉjo. Granda u-tablo prez entiĝis al niaj malsataj ekrigardoj kvanzaŭ belaĵo. Post la kanto de la Espero, nur parkerita de la plej fervoraj, venis la kutimaj portugalaj pladoj, ĉiuj bongustaj kaj iom surverŝitaj de agrabla vinbera suko. La evento marŝis laŭ nia kutima frateco, kiu estas mirinda kiam oni konstatas ke ni, portugaloj, jam vivas en tiu biblia tempo, en kiu ĉiuj bestoj kunloĝas en la plej bona etoso -homoj, krokodiloj. Tri paroladoj spicis la kunvenon, la unua krokodile, la aliaj esperante. En kelkaj samtempaj elementaj kursoj, oni vidas kelkajn gejunulojn krestantaj al la lingvo kaj al la ideo, la afero estas promesa.
Pri moralaj aferoj suficas. Morala notico devas esti donata al la genajbaroj Tiu pri Ĉiĉolino. Ha! kia belaĵo!

Jes, aĵo bela. Ke miaj samideaninoj ne furioziĝu kun mi. Maldomaĝe mi ne ekkonis ŝin persone; sed la televido, la radio kaj la gazetoj donis la necesajn informojn de la "in-formita" persono. Ŝi al-venis, montris la mamojn al la parlamentanojn; publike, en la plej granda salono spektakla, lekamoris kelkajn ulojn, ktp. Jen ekzemplo de kiu nek scias ami nek amori. Pro tio ke mi respektas la homon, mi devas doni ĉi noticon pri kiu ne scias esti virino.

Cetere la portugala politiko daŭras stabila , la ventego kaj pluvego malagrablas, la televido ne taŭgas kaj kelkaj esperantistoj studas esperanton. Ĝis ĉiam!

Johano Santos

# STATISTIKOJ

## jubilea biciklado

| En Hispanio | | Tute |
|---|---|---|
| tagoj | 31 | 280 |
| urboj | 46 | 360 |
| biciklantoj | 10 | 56 |
| el | 3F 1D 6E | 9 landoj |
| laŭ...km | 7300 | 45670 |
| aŭtoritatuloj | 4 | 120 |
| esperantistoj | 230 | 9000 |
| en...urboj | 19 | 240 |
| intervjuoj | 22 3TV | 250 13TV |
| ricevitaj raportoj | 13 | 100 |
| senditaj leteroj | 100 | 5400 |
| gastigado | 8 | 156 |
| mon-donacoj (FF) | 300 | 11500 |

# 44-a IJK en '88

**44-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO**

**ZAGREBO, JUGOSLAVIO**

**16–23.7.1988.**

**"KOMUNIKADO EN LA 21-a JARCENTO"**

*La komisiono pri scienca kaj faka agado de TEJO starigita en 1980 celas plenumi diversajn taskojn por antaŭenigi la sciencan kaj fakan agadon inter la junularo. Nun ĝi serĉas junajn kunlaborantojn (lernantojn, studentojn, fakulojn, laboristojn) kiuj interesiĝas pri la scienco kaj diversaj fakoj. Oni povas aliĝi al jenaj sekcioj: Naturprotektado; Instruanta reto; Medicino kaj Kemio; Filologio - (lingvistiko, literaturo, esperantologio); Matematiko, Fiziko kaj Informadiko; Historio, Arkeologio; Geografio; Juro; Filozofio; Psikologio; Sociologio; Sporto; Turismo; Muziko (teoriaj aspektoj); Foto; Kino; Magnetofonio; Ekspozicioj; Kolektado; Vegetaranismo.*


*Ĉiu kunlaboranto devas sendi siajn nomojn, kompletan adreson, telefonnumeron, naskiĝdaton, profesion/fakon, laborejon, lingvosciojn (kiuj lingvoj, sciogrado), la elektitan sekcion, proponojn pri bona funkciado de la sekcio.*

*Gvidanto de KSA kaj kontaktadreso:*

*DIMITAR VESELINOV DIMITROV*
*KV. Mladost 1A, Bl.501, vh.4, ap.113*
*BG-1000 SOFIA*

*El TT6/30*

## 31a IS de GEJ



*Ĉu malvarme en norda Germanio? Tute ne, en esperanto-aranĝoj kiel IS la etoso ja estas varmega.*

*De la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro partoprenis la 31an IS de Germana Esperanta-Junularo 269 gejunuloj el diversaj landoj. El nia lando estis Iñaki Gauna el Baskio, kaj Pep Tordera kaj mi el Katalunio. La IS-ejo estis junulara restadejo apud bela lago kaj je 4 km de la urbo Hanovro.*

*La temo de la programo estis SANO. Bedaŭrinde mi ne multe povas raporti pri la prelegoj ĉar mi neniun partoprenis. Tamen laŭ miaj scioj estis pluraj sufiĉe interesaj kiel tiu pri AIDS, akupunturo, memkuracado, mistraktado de infanoj, refleksologio, arbarmalsano. Tamen ne nur la prelegoj interesis*

la partoprenintojn, sed ankaŭ la varia distra programo. Inter aliaj eroj: mensoGOludo, muzikado, koruso, dancado, nonoismo. Aliaj gravaj eroj estis naĝvespero, nokta migrado ĉirkaŭ la lago, IJK (prezentado de diapozitivoj pri Krakovo kaj prezento de la 44a en Zagrebo) internacia vespero...
La germana trupo "kia koincido" ludis la unuaktaĵon de Eugène Ionesco "La kalva kantistino", kaj post tio rok-koncerto de Persone. Ĉiu - nokte estis improvizita diskoteko en la restadejo.
Sed l'o plej grava estis la rilatoj inter homoj diverslandaj en tre bona amikeco.
Eble mankis iom da kreativeco far la organizantoj, ne necesis tiom strukturigita programo. Sed tamen tio ne gravas. Tiuj renkontiĝoj internaciaj riĉiĝas ja ĉiujn esperantistojn, eĉ se nur por renkontiĝi kun diverslandaj amikoj.
Nu, la venonta en Zagrebo.

Jesuo Armengol


anonco





## landa agado

Lastatempe HEJS ricevis leterojn el Alĝerio kaj Portugalio. Ili pruvas ke niaj klopodoj por rilati kun niaj najbaraj landoj ekmarŝas kaj vidiĝas la ebleco de fruktodonaj ontaj kontaktoj.

Entute estis sendataj leteroj al 8 portugaloj, 2 marokanoj, 5 alĝerianoj k 2 respondeculoj pri adresoj en Eŭropo por demarsi ĉu krom tiuj adresoj eblas sciiĝi pri aliaj. Aldoni ĉi tie ke, trovi la adresojn estis pacienca k labora tasko ĉar devis helpi nin HEJS-TEJO- k UEA-anoj krom propra adresito en Portugalio.
Kaj el Portugalio kaj el Alĝerio ni ricevis gratulojn kaj kunlabor-dezirojn, kio eĉ jam efektiviĝis per kunlaboro en formo de desegnaĵo el nia amiko Johano, similajn dezirojn konigas s-ano Gonçalo ankaŭ portugalo. Boudmedjou kaj Hafidhi el Alĝerio ankaŭ skribis al ni (en franca lingvo ĉar ni pli sekure devis skribi tiulingve) kun similaj deziroj. Al ĉiuj do, dankon!
Tial ni esperas, ke nia dankemo montiĝu per la alsendo de nia revuo, espereble tio estu la alpaŝo por plej fruktodonaj kontaktoj. Ni ja scias ke la junulara movado en viaj landoj, estimataj najbarlandanoj, ne estas videbla nun, sed ĝuste pro tio, ekzistas paĝo en ĉi revuo kiu jam estas malfermata al vi, skribu do al nia Centra Oficejo.
Ĉiuj deziroj kaj sugestoj estas bonvenigotaj. Dankon


JUNULARA KUNVEN
KARA ŜAFARO: ĈU IU KONTRAŬSTARO?
MI MEM!
DO ... HE, HE.
VI HALUCINAS. JAM SUFIĈAS PRI-PAROLI TIUJN AĈOJN: ... PACO, AMO, FIDO, AMIKECO ...!
Sidiĝu!
...MI PETAS...
FELIP 87
JUNULARA
NI PAROLU, DO, PRI PACKOMPRENO KAJ MONDAMO, ĈU NE?

20a de januaro 1988

kunveni aŭ ne kunveni...?

74a Universala Kongreso
Brighton-Britio

Dum la 80-aj jaroj, komputado ekpopulariĝis. Multaj esperantistoj ĉie interesiĝas pri la ĉiutaga uzado de komputiloj. Atestas tion la forteco de grupoj kiaj KS de HEA, KompRo, KJSOJ, kaj EKK mem.
Ĉi tiuj grupoj faras gravajn laborojn. Sed por ke ĉiuj laboru plej efike, nun estas grave subteni niajn strebojn per la regula provizo de okazoj kunveni internacie. La nombro de membroj faras tion des pli grava.
La EKK deziras iniciati la planadon de aranĝoj dum la 74a UK, celante iujn kiuj interesiĝas pri komputado. Antaŭ ol EKK povas fari tion ni bezonas ideojn por temoj kaj ĝeneralajn petojn por tia kunveno.
Interesuloj bonvolu sendi viajn petojn, sugestojn, kaj komentojn al la sekretario de EKK al la jena adreso:

Esperantista Komputila Klubo
200 Nevells Road, Letchworth, Herts
GB-SG6 4TZ
Britio

Arthur Sly

---

Indiano al blankulo:
-Haŭ, indiano peti piĉon de via filino.
-Ĉu vi volas diri la manon!
-Ne, piĉo. Indiano jam laca de masturbado.

Notxo.

FOLA STUDENTA ESPERANTO-KOMITATO
DE
ASOCIO DE POLAJ STUDENTOJ

ARANĜOJ EN 1988

04.05-10 WARSZAWA. 6a TEJO/PSEK Seminario por aktivuloj: Edukado.
Aliĝoj: ĉe PSEK, ul. Ordynacka 9, 00-950 Warszawa.

08.06-13 TORUN. 10a Somera Studenta Esperanto-Renkonto.
Aliĝoj: Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP UMK, ul. Moniuszki 16/20, 87-100 Torun

08.13-27 TORUN. Lernejo de Pola Kulturo.
Aliĝoj: Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj (en antaŭa)

08.27/09.03 RECZ. Somera Esperantista Ripoztendaro.
Aliĝoj: ul. Szpitalna 1/40, 85-826 Bydgoszcz


10.20/23 POZNAN. VII Arkones (Artaj Konfrontoj en Esperanto)
Aliĝoj: Ela Malik. ul.Podmiejska 15, 61-357 Poznan

11/17-20 LODZ. 10a Konferenco: Internacia Lingva Komunikado.
Aliĝoj: Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP UL, ul. Narutowicza 41, 90-925 Lodz

12.27/88.01.03 montare. Silvestra Esperanto Renkonto.
Aliĝoj ĉe Studenta Esperanto-Klubo, RO ZSP, ul.Fredry 7, 60-967 Poznan

Ciuj PSEK aranĝoj partopreneblas laŭ la kondiĉoj de la dendeviza persontaga interŝanĝo baze de la kontraktoj kun la E-organizoj.

# PER MOLTS SEGLES!



*Santa Coloma de Gramenet kuniĝas al Barcelono sed ne estas parto de ĝi. Tute male, ĝi estas urbo kun propa identeco. Laŭ unua dokumento konservata, ĝia anktiveco aĝas 800 jarojn. La historio konfirmas ke, la tagon 10a de novembro de 1187 estis konsekrata la preĝejo de "Santa Coloma" far Bernat de Berga, tiama episkopo de Barcelono. Tiel do, ni trovas tiun Santa Coloma kiu, sin dediĉante al la kulturado, ekspansiiĝis ĉirkaŭ la pregejo kie nun oni kultas la virgulinon "Coloma".*

*Ĉi preĝejo estis romanika (ankoraŭ hodiaŭ en tiu nuna, oni konservas kapitelon). La dua preĝejo romanika ekzistis ĝis la jaro 1761, kaj profitante ĝiajn murojn oni konstruis alian baroka, bruligita kaj detruita la jaron 1936 (hispana civitana milito). La aktuala preĝejo, eĉ rememorigante siajn devenojn, estas la plej moderna en la urbo.*

*Ĉi tio pensigus nin pri malnova urbo, tamen ne tiel statas la afero. Ni nomas ĝin "junulara urbo" ĉar ĝia aktuala strukturo urba kaj ĝia organizo estas juna, kaj grava procento el ĝia loĝantaro estas ankaŭ junuloj. Tio ĉi aspektigas ĝin tute moderna kaj dinamika.*

*La enblemo, kiel ĝia nomo tre bone montras, estas la "Coloma" (kolombino) kio estas simbolo de paco, paco kiun nia urbo volas por si mem kaj por la tuta homaro, jam plurfoje demonstrite. Per ĉi 800 jaroj da historio kaj per ĉi juneco nin karakterizanta kiel "junulara urbo", ni volas ke nia mesaĝo "JE MULTAJ JARCENTOJ" fariĝu realo malgraŭ ke ni ne povos tiam ĝui ĝin. Ĝuste pro tio ni fieras festi ĝin nun, pensante en tiu estonteco.*

*Anna Pedrola*

800 ANYS
SANTA COLOMA DE GRAMENET
1987 NOVEMBRE 1988

SANTA COLOMA
ciutat jove

Ajuntament de
Santa Coloma de Gramenet